Cyrhla, 1956
(Cyrhla, 1956)

Chi tie kreskas la pinarboj pli alte
kaj sur la supro de la montet' ili atingas la chielon.
La negho ghisgenua.

Sur la vojo venas geknaboj,
kun eta paketo en la mano,
au kun eluzita valizo.
en ghi dentobroso, kelkaj shanghvestajhoj.
Kaj la lud-ursideto kun bonodoraj memoroj
de pasintjara Kristnasko.

Venas la geknaboj
surkape varma chapo, tuko.

Patro, patrino tiom malproksime,
sed en ilian memoron
enbrulighis
frazo de la lasta brakumo:
- Sed gardu vin !

Venas la geknaboj, surpiede
shuo eluzita kun maldika plando.

Ili venas de ie al la nenie,
de hejmo al fremdo.
Lace kaj malsate.
Shuplando traakvighis,
la shushnuro malligighis.
Sed kiel hejme en la fabelo
en la posttagmez' nebulo,
jen konjektighas la ligna domo.
Ene varmo, homa vorto,
preparita lito.
Kiam ekaperas la stelo vespermangha
oni donas manghi: fumitan fromaghon
teon, buterpanon.

Venas la geknaboj de kuglo shirita
Budapeshto sur neghkovritaj vojoj
de Pollando

Anaseto banas sin……
Frostaj ventoj
prujno petalojn kreskigas
sur ghiaj molaj plumoj…..

Tradukita de János Ruff